

esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 5 / 2015



Esperanto: la oficiala lingvo de meditado-aranĝo en Koreujo

Inter la 8-a kaj la 12-a de Oktobro estiĝos en Seulo (Suda Koreujo) la 11-a Internacia Renkontiĝo de Meditado. Esperanto estas ĝia oficiala lingvo.

La programo konsistas el meditsesioj, ekskursoj kaj prelegoj pri Ŭonbulismo, la korea religio, kiu subtenas tiun aranĝon. Oni atendas la aliĝon de ĉirkaŭ 40 homoj el pluraj landoj. La organizado estas je la respondeco de Esperantista Asocio de Ŭonbulismo.



11A INTERNACIA RENKONTIĜO DE MEDITADO



Esperantista Asocio de Ŭonbulismo (prezidanto KIM Sang-ik)

ĉiujare okazigas enhavriĉan renkontiĝon kun diversaj programeroj, en kiu oni povas praktiki meditado, fari komunan ekskurson al vizitindaj lokoj, sperti korean kulturon, ekkoni pri Ŭonbulismo kaj tiel plu.

1. **Kiam:** 2015 oktobro 8 (ĵaŭdo) – 11 (dimanĉo), 3 noktoj kaj 4 tagoj
2. **Kie:** Junulara Trejnejo *Bongdo* en Seulo, Koreio
3. **Enhavo:** meditado, korea kulturo kaj tradicia ludo, prelegoj, ekskurso, amuzaj ludoj, bankedo kaj tiel plu
4. **Kotizo:** 50 eŭroj aŭ 70 000 Ŭonoj (programo, manĝo, loĝo, bankedo)
5. **Nombro:** 20 personoj el ekster Koreio kaj 20 el Koreio
6. **Oficiala lingvo:** Esperanto
7. **Aliĝlimdato:** 20a de septembro 2015
8. **Prelegoj:** temoj pri meditado estas bonvenaj.
9. **Kontakto kaj aliĝo:** ĉe LEE Jungkee (esperanto@saluton.net)



K O L O F O N O

40a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la
 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita
 kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>
Prezidanto : JM Nicolas de BUYL : prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
Sekretario : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG** : www.esperantobruselo.org
Abona membriĝo : 12 aŭ 18 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
Kunvenejoj : 1° ĉe «**De Pianofabriek**» (**DPf**) : Rue du Fort-straat 35, en 1060 Bruselo, Metroo : Parvis de St-Gilles/St-Gillis Voorplein
 2° ĉe la **Eŭropa Komisiono (EK)** : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo - Metroo Maelbeek/Maalbeek

A G E N D O



Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org

Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede ekde la 16a de Septembro, en nia **nova** kunvenejo:

De Pianofabriek, 35 rue du Fortstraat, 1060 Bruselo.

Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,
 bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981

SEPTEMBRO

Merkredo la 9a	18:30 - 20:00 (EK)	Unua postsomera kunveno ! ĉe la Eŭropa Komisiono ! rue van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo (VM2)
Sabato la 19a kaj Dimanĉo la 20a	14:00 - 18:00 (DPf)	Malfermaj pordoj ĉe De Pianofabriek (prezentadoj pri Esperanto, fulmkursoj, kantatelieroj, ...)
Merkredo la 23a	18:30 - 20:00 (DPf)	Prelego : Marcel Delforge pri Historio de Kelmiso ("La Calamine")

OKTOBRO

Sabato la 3a	14:00 - 16:00	Konversacia rondo en Dilbeek Lydia Buyst : 054 33 01 51 http://www.esperanto.be/lokgrup.php
Merkredo la 7a	18:30 - 20:00 (DPf)	Prelego : Bernard-Régis Larue pri Kamenoj de Feinoj
Lundo la 12a	19:00 - 22:00	Babilemaj Spagetoj Garden City, Place de la Liberté 6, 1000 Bruselo mlaitat@yahoo.fr
Merkredo la 21a	18:30 - 20:00 (DPf)	Paroliga ludo organizata de Mišel Laitat La Longa Vorto
de Ven. la 30a/10 ĝis Dim. la 1a/11	4a	KKPS en Heerlen KKPS 2015 - Esperanto Nederland

NOVEMBRO

Merkredo la 4a	18:30-20:30 (EK)	ĜENERALA ASEMBLEO de EBG ! ĉe la EK ! Efektivaj membroj estas insiste - kaj estraranoj tre insiste - petataj ĉeesti.
Sabato la 7a	14:00 - 16:00	Konversacia rondo en Dilbeek Lydia Buyst : 054 33 01 51 http://www.esperanto.be/lokgrup.php
Merkredo la 11	18:30 - 20:00 (EK)	Babilronda kunveno ! ĉe la Eŭropa Komisiono ! rue van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo (VM2)
Lundo la 9a	19:00 - 22:00	Babilemaj Spagetoj Garden City, Place de la Liberté 6, 1000 Bruselo mlaitat@yahoo.fr

Saluton Kara Legantaro !

Jesigita ! Ni havas nun tutnovan lokon por niaj regulaj merkredaj kunvenoj: kursoj kaj prelegoj. Kie? En la fama kulturejo De Pianofabriek» (DPf), en iu vigla bunta kvartalo, en Sankta-Giliso. Tie, ni esperas renkonti vin amase por spekti prelegojn kaj poste babili ĉe la drinkejo, ktp...


Atentu ! Ni gardas nian malnovan lokon en la Eŭropa Komisionejo (EK) por niaj specialaj kunvenoj, ekz. nia Ĝenerala Asembleo (4 Nov.).

Nelge, la 100a Uk sukcese finiĝis ...
Vivu la 101a en Nitro, Slovakio ! 😊
Pro tiu granda evento en Lillo, eksterlanda najbara urbo, ni dediĉis kvin paĝojn (paĝoj 16 ĝis 20) kiel fotaro de la Universala Kongreso.



Esperante ke tiuj fotoj bone kaptis la etoson kongreseje kaj ankaŭ surstrate !

Bonan legadon al ĉiuj !
Viaj redaktoroj
aktuala@esperantobruselo.org



Enhavo

- Paĝo 2 : 11a Internacia Renkontiĝo de Meditado
- Paĝo 3 : Kolofono kaj Agendo
- Paĝo 4 : Edito kaj Enhavo
- Paĝo 5 : Lupo kaj ŝafido
- Paĝo 6 - 7 : La rakonto «Esperanto» de Amos Oz
- Paĝo 8 : Kant Konk-urso
- Paĝo 9 - 11 : Vojaĝo per bicliko tra la mondo
- Paĝo 12 : La Oka Pordo
- Paĝo 13 : La 100a UK en Lillo
- Paĝo 14 - 15 : Rezultoj el 100a UK
- Paĝo 16 - 20 : Fotaro de la 100a UK

LUPO kaj ŜAFIDO

Jean de la Fontaine

Motivo estas bona se ĝin forto donas
Ni tion montros per jena vorto :
ŝafido pro soifo trinkis el rivero, puran akvon...

Alvenis lup' serĉanta aventuron...

«KIU PERMESIS AL VI MALPURIGI MIAN TRINKAĴON ?»

ekkriis la kolera besto

«PRO VIA MALTIMO ESTOS VI PUNITA !»

«Majesto...»

diris la ŝafido,

«Via Moŝto ne senmotive ekkoleru,
sed ..konsideru ke vere mi estis trinkanta
el flu' de la rivero, pli ol dudek paŝoj
sub loko ĝia, kaj malpurigi tiel,
mi povos fari neniel...»

«VI MALPURIGIS ĜIN !»

respondis best'rabia

«...kaj mi scias ke vi kritikis min, jar'Pasintan..!

«Kiel mi faris, mi jam ne estis naskiĝinta,
mi ankoraŭ suĉas al patrino mia...»

«Se ne estas vi, estas frato via...»

«Ne havas mi...»

«Do, estas iu el via familio, ĉar vi ne maltrafas
min, vi, viajn paŝtistoj kaj hundoj...
Oni tion diris al mi, nepre min venĝos mi!»

Kaj tiam en la profundo de la arbaro...

lupo manĝas ĝin sen kroma procedo...



La rakonto "Esperanto" de Amos Oz



Amos Oz estas verŝajne la plej elstara kaj internacie konata verkisto de Israelo. Se en la proksimaj jaroj dua israela verkisto ricevos la Nobel-premion pri literaturo

(la unua estis Ŝmuel Josef Agnon en 1966), tiu verŝajne estos Oz (de 2007 li plurfoje estis kandidato por la Nobel-premio). Li ricevis i.a. la premion de Israelo kaj la Goethe- kaj Heinrich-premiojn pri literaturo.

Liajn verkojn oni tradukis en 42 lingvojn (nia nuna traduko estas do la 43-a lingva kaj unua traduko de Oz-verko en Esperanton) kaj ili estas multe aprezataj kaj ŝatataj en la monda literaturo. Inter liaj 38 libroj plej famiĝis "Mia Mikaelo", "Rakonto de amo kaj mallumo" kaj aliaj. Kiel infano li kreskis en Jerusalemo, kaj poste kiel knabo forlasis la urbon por vivi en kibuco. Tio reflektiĝas en lia verkaro: multaj el liaj noveloj temas pri la kibuca kolektivisma vivo.

En la libro "Inter amikoj" Oz revenas al la loko kaj tempo, kie kreskis lia verkaro: la kibuco en la fino de la kvindekaj jaroj. Per la rakontoj en tiu libro li provas rompi la idealisman bildon de la kibuco (simile al aliaj israelaj verkistoj, kiel ekzemple Meir Shalev). La rakontoj priskribas la ŝanĝiĝon de la kibuca originala idealismo de la pionira epoko, el kiu nuntempe restas nur kolekto da homoj, kies frateco kaj reciproka

respondeco estas iom-post-iom malaperantaj.

La ok rakontoj okazas en kibuco kun la fantazia nomo Jikhat, kaj priskribas kiel tia kolektivisma organizo ne ebligas al diferencaj kaj solecaj individuoj trovi sian lokon en la kibuca medio. Ĉiu el la rakontoj desegnas mirinde delikatajn bildojn de virinoj kaj viroj, kiuj revas kaj suferas en siaj privataj vivoj en la ombro de giganta kolektivisma revo: la kibuca idealo.



En la novelo "Esperanto", la morto de la esperantisto Marteno Valenberg, la lasta idealisto, kiu kredas en absoluta komuneco de la homa socio, reprezentas la malrapidan sed ne eviteblan kolapson de la kibuca idealo kaj tradicia socio.

Eble la sento de trankvileco, kiun spertas Osnat post la morto de sia maljuna amiko Marteno, sugestas, ke

Oz fine trovis la respondon por sia serĉado, kaj kiel Osnat, li trovas konsolon en la revolucio en la kibuca socio kaj idealoj. Amos Oz daŭre akompanas nin per sia flua kaj elokventa stilo, kaj ni povas ĝui ĉiun frazon aŭ metaforon, kiun li bonvolas dividi kun ni.

Traduki tian novelon estis por mi, unuafoja tradukanto de beletra el la hebrea, aparte peza respondeco, ĉar tia tasko postulas ne nur perfektan regon de la fonto- kaj cel-lingvoj, sed ankaŭ bonan konon de la socia

kaj kultura fono de tiu epoko kaj medio (la kibuco).



Aldone al tio, kion mi lernis kaj aŭdis vivante, dum la lastaj 40 jaroj, en Israelo, kies kulturo estas forte ligita al la kibuca ideo kaj socio, mi ricevis tre rimarkindan kaj nemalhaveblan helpon de nia movade konata samideano Amri Wandel, prezidanto de la Israela Esperanta Ligo, kiu spertis iom da kibuca vivo.



Plurfoje dum la tradukado ni longe cerbumis kaj serĉis taŭgan vorton aŭ vortumon, kiu plej akurate transdonu la etoson aŭ la nuancon, kiujn celis la verkisto.

En dekoj da kazoj mi kaj Amri diskutis kaj foje eĉ disputis, pri iuj malofte uzataj Esperanto-vortoj, esprimoj aŭ vortumoj, kaj ni bezonis plurajn iteraciojn, ĝis ni fine atingis interkonsenton.

Nia fina kaj plej grava danko iras al la verkisto, Amos Oz, kiu ne nur oficiale permesis laŭleĝe traduki kaj eldoni sian novelon en Esperanton, sed ankaŭ afable konsentis renkontiĝi kun ni por rakonti sian specialan historion rilate al Esperanto kaj pri la fono malantaŭ la novelo "Esperanto".



En venonta sonartikolo mi prezentos selektitajn pecojn el la verko, eldonita nun kiel speciala numero de la revuo "Israela Esperantisto".

<http://esperantaretradio.blogspot.be/2015/05/unuasperto-pri-traduko-de-beletra.html>

Kanto konk-urso !



Ĉu vi ŝatas spekti kantistojn ?

Nepre venu al la Kanto-Konkurso_!!!

-> <http://esperanto-hamburg.de/esperanto-kanto-konkurso/>

Dum la **2a de oktobro 2015** ekde 19:30 la konkurso okazos en granda salono de la kulturbutiko St. Georg en **Hamburg** (Germanio). Ĉiuj kandidatoj unue kantas du kantojn. La publiko en la salono estos la ĵurio kaj elektos la 4 kandidatojn kiuj kantas plian kanton. Denove la publiko decidos kaj du kandidatoj estos en la finalo kaj kantas sian favoratan kanton el la tri kantoj. Nun la publiko elektos la gajnanton.

Jen niaj premioj:

1a rango: 333 eŭroj (1 kandidato)

2a rango: 222 eŭroj (1 kandidato)

3a rango: 111 eŭroj (4 kandidatoj)

La kantokonkurso de Eŭropa Radio-Unio, angle *Eurovision Song-Contest* (ESC), jam dum jardekoj estas speciala evento en la televida historio de Eŭropo. Malgranda konkurso kun sep landoj iĝis grandskala aranĝo kun partoprenantoj el pli ol 40 landoj. Kaj kun la partopreno de Aŭstralio tiu kantokonkurso, kiu estas dissendita tra la tuta mondo, fariĝos mond-evento kaj montras ke muziko taŭgas por ligi popolojn kaj kulturojn.

Por la 111-jara jubileo de sia asocio, la membroj de Esperanto Hamburg planas similan kantokonkurson por Esperantlingvaj kantoj. Verŝajne la unuan fojon okazos Esperanto kanto-konkurso en Hamburg, en la domo de kulturasocio kie regule renkontiĝas grupoj el dekoj da landoj. Ĉu freneza ideo? Certe ne, sed bone planita kun entuziasmo. La hamburgaj amikoj de la internacia lingvo planas tiun eventon kiel kulminon de la jubilea jaro.

(...) Ne estas kompareble al la ESC en televido, sed ankaŭ tiu havis malgrandan komencon.(...)

Multe pli grave ol la premioj estas ja la plezuro por ĉiuj kaj la bona ideo de tiu kanto-konkurso kiu ebligas al granda publiko havi impreson de la kulturlingvo Esperanto.



Ralph Glomp

Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'



Nepalo


2/10 -> 30/10/2009 - 413 km (10487 km)

▷ Nepalo estas lando de jino kaj jango, de ĝusta ekvilibro inter bono kaj malbono, belo kaj malbelo. Koncerne nin, de la komenco ĝis la fino, ĉiu bonaĵo prezentos sian malon. Belega lando por turistoj, malfacila por vojaĝadantoj. Ja tie ni spertos nian plej grandan misaventuron ekde la komenco de la vojaĝo, antaŭ ol foriri de la lando.



Post dudek kilometroj tra ebenaĵo fine ekaperas antaŭ ni la unua montara ĉeno, grandega, verda, moŝta. Estos malfacile supreniri, sed ni scias, ke ni rekompense akiros iomete da malvarmeta, 30° anstataŭ ol la kutimaj 48°. La pejzaĝoj fariĝas belegaj: akvofaloj (ne plu necesas filtri akvon), abunda vegetalaro, liberaj simioj ekster urboj. Tio bedaŭrinde ne daŭras longe. En la montaro la vojstato fariĝas katastrofa. El la faloj venas akvo ne malvarma sed ja varmeta. Kaj hurladas la kamionaj, aŭtaj kaj motorciklaj hupadoj, ĉie, ĉiam, diurne.

En Nepalo, same kiel en Barato, la prezoj tre malaltas. Sed, male al la antaŭa lando, ili ŝanĝiĝemas ene de sekundoj. Kiam ni demandas pri prezo la komercistoj anoncas ĝin, kaj tuj modifas ĝin... plialtigen. Por citi nur kelkajn ekzemplojn, ni trovas hotelon je 300 rupioj. Dum Cirilo estas supreniganta sian biciklon por enĉambrigi ĝin, Roz' jam arigas la monon por pagi, ĉar ni mefias pri ilia fi-tekniko. La akceptisto tiam diras: "ne, estas 600 rupioj", prezo de luksa hotelo! Cirilo retroigas la biciklon malsupren. Intertempe alvenas la hotelestro. Li demandas al ni, kio okazas. Li parolas pri miskompreno kaj petas ke ni restu. Li eĉ donas al ni rabaton je 30 rupioj el la 300!





La afero samas pri ĉuj nutraĵoj. En Tansen, pasas virino portante korbon plena je benjnetoj. Baratana turistino aĉetas kontraŭ 10 rupioj, kaj dum la aĉetintino fokusas al empoŝigo de sia ŝanĝmono, la vendistino rapide deprenas kvar benjetojn el la saketo. En alia vilaĝo, inter dek vendejoj, la prezo de sama sodakva botelo flugas de 85 ĝis 180 rupioj. Ni renkontas du aliajn perbiciklajn vojaĝantojn el orienta Francio, kiuj ankaŭ rakontas pri similaj misspertoj.

La morgaŭon, en suprenirejo, ni vidas agoniantan bovon. Ĝi havas vundon sur gambo. Kiel en Barato, kiam besto akcidentiĝis, oni vojflanken lokas ĝin kun protekto per du aŭ tri ŝtonoj anbaŭflanke kaj oni lasas ĝin morti pro soifo. Tio memorigas Baraton al ni, kiam ni donacis nian sandviĉon al viro kun ege pusa piedo envolvita en ĵurnaloj, side sur la grundo apud malsanulejo, petante nenion al neniu kaj ignorata de ĉiuj.

Ni haltas kaj donas la enhavon de niaj boteletoj al la bovo, kiu tuj lektrinkas. Ĝia lango bluas, ĝia okulo ruĝas. Tuj post nia foriro ni trovas akvofalon. Ni retrovenas por denove trinkigi la bovon kaj ni ankaŭ nutras ĝin per pantranĉaĵoj. Ĝiaj okuloj kaj lango reakiris belan rozan koloron. Iuj virinoj haltas por rigardi nin sen paroli.

Ni reekiras iom ĉagrene, ni verŝajne nur prokrastis ĝian vivlimon. Ni bezonas kvar tagojn por suprengrimpi la 160 km al la unua granda urbo, Pokharo. Tie, nia gastiganto, Pradip, igas nin gustumi la nepalajn pladojn. Kun li, ni ankaŭ vizitas lokan esperantiston. Ni pli facile komunikas kun tiu en Esperanto ol kun Pradip kiu bone scipovas la anglan. Ni tiel ekscias pli pri nia gastiganto dank' al la traduko de la esperantisto ol dank' al Pradip mem.

Pradip kaj iu el liaj amikoj portas nin per motorcikloj tra la urbo, tiele vizitigante inter alie luksegan hotelon en belega ĉirkaŭaĵo kun preĝradoj, malnovaj objektoj, fontanoj, nepalaj ĝardenoj. La prezo por unu nokto en tiu hotelo superas nian suman buĝeton por elspezi en tiu lando.



La morgaŭon, ni rendevuas kun Sébastien, franco vivanta en Nepalo. Li malkovrigas Momo-ojn al ni, bongustegajn raviolojn kun bufalo interne, kaj Ĉomej-ojn, frititajn spagetojn kun specoj de bufalo. Sed ĝenerale, la nepala kuirarto malmulte varias, ĉar ili manĝas la saman pladon el rizo kaj legomoj kun supo el lentoj matene, tagmeze kaj vespere. Je la unua aspekto ĝi ne estas tiom spica kiom la barata. Ĝi havas subtilan guston sed temas pri insida

kaptilo por niaj stomakoj, kiuj ne eltenos ĝin.



Dum nia restado komenciĝas alia religia festivalo. La domoj kaj vendejoj ornamigas per koloroj, lumoj, floroj kaj kandletoj. Ekde la noktiĝo, je la 18-a horo, infangrupetoj haltas antaŭ ĉiu butikoj kaj ĉiu domo, iu el la infanoj kantas kaj la aliaj kunkantas la reekantaĵon. Rekompense, la loĝantoj donacas al ili bileton je 5 aŭ 10 rupioj aŭ bombonojn.

Dum la festivalo, iam hundoj portas kolringon el floroj, la morgaŭon bovoj, poste homoj kaj motorcikloj, sen paroli pri la domoj ornamitaj per florgirlandoj.

je tiu okazo oni ankaŭ kreas mandalojn front' al la domoj per ardkoloraj dekoraciaj pulvoroj vendataj sur ĵurnalfolio surgrunde deponita. La infanoj portas ilin ruĝaj sur la fronto kaj la virinoj je la radiko de la hararo. En tiu lando ĉio estas kolora, bilda kaj simbola. Kaj ĉiu templo fotindas, precipe en la ĉefurbo, plena je arkitekturaj valorajoj, kiuj tamen ja bezonus restaŭradon.

En Katmanduo, la ĉefurbo, akceptas nin Biĝaj. Li estas gvidisto pri tramontara ekskursado kaj li scipovas la francan lingvon. Li multe helpas nin pri burokrataĵoj kaj ankaŭ bone konsilas nin por viziti la urbon.

Ni tamen estas lacaj. Estas malfacilege sin nutri. Ni devas aĉeti tinuson en ladskatoloj kaj panmolaĵojn ĉar niaj stomakoj ne eltenas la lokajn nutraĵojn. La litoj ne havas matracon, nur plumsakon sur tabulo el ligno, kaj ĉiumatene doloras niaj korpoj. La akvo nur malvarmas kaj estas regule malhavebla dum pluraj horoj en la vesperoj, same pri elektro.

Ni subite decidis rezigni pri Bangladeŝo kvankam ni jam posedas vizon, por rekte iri al Tajlando, des pli ke la flugbibetoj malpli kostas elde Katmanduo ol elde Dako aŭ Kolkato.

Post inventaro de ĉio ne nepre necesa, eventuale eĉ superflua, ni decidis allasi kelkajn posedaĵojn niajn kaj resendi ilin Francien. Iuj malkonsilas la sendon pere de la loka poŝto, laŭdire malfidinda. Prefereble rilati al privata transportisto. Ni vizitas plurajn el ili kaj ni elektas iun iomete pli koston ol la aliaj sed ŝajne seriozan. Ĝi asertas pri perreta spurado de la pako, rapida livero en flughaveno de ni elektita kaj asekuron okaze de perdo. La sendokosto iom altas, 60 eŭronj por 12 kg, sed eĉ pli altus se ni sendus hejmen. Ni bonŝance havas amikon, kiu loĝas ĉe la flughaveno Orly, sude de Parizo, li facile povos preni la pakon por ni.

Ĉio bone sed... kiam ni revenas por vidi la transportiston kun la celo akiri la fakturon, ĉeestas nur dungito lia, ne eblas retspuradi la pakon kaj li ne trovas la fakturon. Ni revenas poste, daŭre ne videblas la estro. La dungito ĉi-foje prezentas la fakturon sed daŭre ne eblas vidi la pakon per la reto. Ni insistas, li telefonas al la flugkompanio. La pako alvenos en la flughaveno Charles de Gaulle, norde de Parizo, sed li asertas al ni, ke li zorgos por translokigi ĝin al Orly, en la sudo.



daŭrigota

La oka pordo 4/4

Tiun ĉi radiodramon verkis kaj produktis Luiza Carol



Antikva egipta pentraĵo: transmonda juĝceremonio. Sur la pesilteleroj: homa koro kaj la plumo de Maat.

DUA SCENO:

"EN LA TRONSALONO DE RA"

(*daŭrigata*)

AIDA: Ho! Jen nova pordo...

RADAMES: La ĉiopova Ra flustras ion en la orelojn de Bes... Kio okazos?

AIDA: Sst...*[paŭzo]*

BES: Mi, Bes, kiu kapablas distri infanojn, pretas permesi al la ĝojoj de Aida kaj Radames pasi trans la Magia Pordo De Ĉiela Rido.

RADAMES: Donu la manon, Aida. Ni transpasu la okan pordon! *[paŭzo kun muziko]*

RA: Nun, la vojaĝo de Aida kaj Radames estas cent procente laŭleĝa. Hmm, ni perdis multan tempon pro la interveno de Set. Kaj mi hastas... Brilanta Maat, mi petas mallongigon de la ceremonio. Bonvolu laŭtlegi tre rapide la liston pri la pekoj de la kandidatoj.

MAAT: Mi proponas, ke mi laŭtlegu nur la liston de tiuj pekoj, pri kiuj la kandidatoj NE kulpas. Tia listo estas kutime malpli temporaba kaj ĉiukaze pli interesa...

RA: Jes, jes. Bonvolu.

MAAT: "La kandidatoj neniam perfidis siajn infanaĝajn revojn."

RA: Bonege...

MAAT: "La kandidatoj neniam forgesis ĝui muzikon."

RA: Tre bone, tre bone...

MAAT: "La kandidatoj neniam ĉesis ami la florojn."

RA: Ĉu vere? Ĉarme, tute ĉarme...

MAAT: "La kandidatoj neniam kuiris malbongustajn manĝaĵojn."

RA: Laŭdinde! Eĉ tre laŭdinde...

MAAT: "La kandidatoj neniam kuiris malsanigajn manĝaĵojn."

RA: Hoo! Eĉ pli laŭdinde... Brave! Brave!

MAAT: "La kandidatoj neniam perfidis sian amon."

RA: Hmmm... Belega vivraporto!

Splendida Maat, vi povas komenci la sanktan pesadon.

MAAT: Mi rememorigas al vi, ke por atingi eternan liberecon, ĉiu animo devas pezi ne pli ol mia plumo. Princino Aida, bonvolu surmeti vian animon sur la pesilon...

[paŭzo kun sonefekto] Gratulon! Generalo Radames, bonvolu surmeti vian animon sur la pesilon *[paŭzo kun sonefekto]* Gratulon! Ambaŭ animoj taŭgas por liberiĝo.

RA: Mi, la ĉiopova Ra, la leĝfaranto en la ĉielo kaj sur la tero, decidas: Aida kaj Radames vivis belajn, inspiropovajn vivojn. Ili meritas senfinan liberecon. Mi permesas al ili krei arton laŭ sia plaĉo. Nek en la ĉielo nek sur la tero ekzistas pli altkvalita libereco ol la libereco de kreado. Mi permesas al iliaj animoj reveni ree kaj ree sur la teron. Post kelkmil jaroj, ili estos permesataj inspiri faman spektaklo-muzikon al tiama fama komponisto, kiu nomiĝos Giuseppe VERDI. La juĝceremonio finiĝis.

FINO

100a UNIVERSALA KONGRESO EN LILO

Lingvoj, artoj, valoroj en la dialogo inter kulturoj



2689 aliĝintoj el 82 landoj !
Abunda programo en la kongresejo kaj ekster ; muzika spektaklo « *L'espéranto, un pas de géant pour l'humanité* » sur la Teatro Placo aŭ koncerto de JoMo dum la tago en la urbo !

80 personoj (el ekstere) venis por « *un cours express* ».
Estis multaj interesaj prelegoj, seminarioj, informadoj pri ekzemple : verduloj, strategia forumo, pacedukado, blinduloj, azia agado , instruado, lernado,....sed ankaŭ kant-ateliero, eŭritmio, internacia koruso, teatro, filmo, ech futbalmatĉo !

Ni vere spertis ke esperanto vivas, en fraterna etoso, foje en kunlaborema etoso, ĉar ĉiu povas sin esprimi kaj kontribui laŭ siaj spertoj, interesoj, deziroj.

Mi vidis ke ankaŭ tie troviĝas homoj kiuj deziras agadi por pli justa mondo kie la interkompreno realiĝos. Sed laŭ mia vidpunkto, la bazo de tiu transiro (al nova mondo) estas la reala respekto de ĉiu homo : bezono de nutrado, bezono de digna loĝejo, de liberpenso.

Tiam komencos fraterna mondo.

Al tiu mondo la Esperanto-movado volas kontribui : la kulturoj alproksimiĝas unu la aliaj, la dialogo inter kulturoj ekas diversmaniere tra la lingvo.

Esperanto estas afero de « korsento,

kunsento » tra artoj, amikeco, paco, justeco.

La Esperanto-movado volas ankaŭ partopreni en la nuna epoko per moderniĝo, adaptiĝo : Ekzemple, la renovigenda retpaĝo de UEA, la nuna poŝtelefona aplikaĵo kun esperanto... Kelkaj aktivuloj strebas por pli fortika pozicio de Esperanto en la eksteraj rilatoj. Ili celas pruvi ke esperanto efikas kiel laborlingvo dum internaciaj kunvenoj, komisioj, forumoj ktp.

Tiusence multe valoras la Grundtvig-partneraj projektoj.

Tiuj projektoj estas subvenciitaj de Europo-Unio (!) kaj montras esperanton kiel ALDONA valoro por kunkonstrui internacian kunlaboradon !

Ne forgesu ke ni pilgrimis al Bulonjo-sur-maro kie Zamenhof en aŭgusto 1905 alparolis la unuafoje al la kongresanoj. Estis la komenco de « esperanto, parola lingvo » (antaŭ, ĉefe skriba lingvo). Baldaŭ en tiu urbo malfermiĝos kultura centro parte dediĉita al Esperanto.

Multaj televid aŭ gazet aŭ ret- elsendoj pri tiu semajno okazis !

Ni foriris kun la deziro pluvivi nian entuziasmon por Esperanto kaj ties diisvastiĝon.

Catherine Royaux

Televidjurnalo el «RTBF»



Rezultoj el 100a UK de Esperanto



Rezolucio de la 100-a UK

La 2 695 partoprenantoj en la 100-a Universala Kongreso de Esperanto,

kunveninte el 82 landoj, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2015, en Lillo, Francio,

diskutinte la temon *Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj* en sep diversaj sesioj tra la kongresa semajno, **volante kontribui** al la disvolviĝo de la Internacia Jardeko por la Alproksimiĝo de Kulturoj proklamita de Unesko,

konstatas, ke interkultura dialogo estas same urĝe necesa hodiaŭ, kiel ĝi estis antaŭ 110 jaroj, kiam okazis la unua Kongreso de Esperanto en Bulonjo-ĉe-Maró;

asertas, ke por vere interkomprenigi la homojn, tiu dialogo devas esti afero ne nur de la cerbo sed ankaŭ de la koro, kunplektanta klerigon kaj kundiskutadon, arton kaj amikecon;

atentigas, ke ĝuste tian multflankan interkulturan dialogon praktikas kaj disvolvas la tutmonda Esperanto-movado en siaj centoj da kongresoj kaj renkontiĝoj ĉiujare;

instigas ĉiujn aliajn aktivulojn kaj movadojn por interkultura dialogo doni pli

da atento al la lingva dimensio de sia laboro, kaj al la reala funkciado de Esperanto kiel lingvo inkluziva kaj egaleca, kies uzado povas plifaciligi kaj pliprofundigi tian dialogon;

ree dediĉas sin al la kultivado kaj disvastigado de la valoroj de reciproka respekto, paco kaj justeco inter ĉiuj homoj, konforme al la celoj de Unesko kaj kunlige kun la aktualaj streboj de Unuiĝintaj Nacioj por konstrui daŭripovan mondan socion.

6-A Afrika Kongreso de Esperanto okazos en Burundo en 2016

Konforme kun decidoj faritaj en la 5-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE), la 6-a AKE okazos en Burundo en 2016.

Same kiel ĉiu antaŭa AKE, ankaŭ ĝi estos organizata de la Afrika Komisiono de UEA kunlabore kun la landa Esperanto-asocio (ANEB) kaj lokaj aktivuloj en Burundo.

La Estraro de UEA atentigas, ke la uzo de la titolo "6-a AKE" por la aranĝo anoncita por la fino de 2015 ne havas aprobon de la Afrika Komisiono de UEA nek de la Estraro de UEA.

Ĉar laŭ la provizoraj informoj ĝi havos indan enhavon, ĝia preparado kompreneble rajtas pluri kaj UEA ankaŭ povos helpi diskonigi ĝin, sed ne sub tiu nomo.





UEA Premiis 22 elstarajn agantojn

En la Solena Fermo de la 100-a Universala Kongreso en Lillo estis anoncitaj la nomoj de 12 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.

Jen la ĉi-jaraj distingitoj:

Diplomo pri Elstara Agado:



Richard Delamore

(Aŭstralio) pro la realigo de la reta Esperanto-Televido;

Doi Chieko (Japanio) pro longtempa redaktado de "Esperanto en Azio";

Ilona Koutny (Pollando) pro la gvidado de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato A. Mickiewicz en Poznano;

Birthe Lapenna (Danio) pro konservo de la materialoj pri la Montevidea rezolucio k.a. dokumentoj de Ivo Lapenna ĉe la Dana Ŝtata Arkivo;

Ĵak Le Puil (Francio) pro la eldonado de la revuo "La KancerKliniko" ekde 1976;

Ana Manero (Hispanio) pro la gvidado de la projekto Bitoteko de Hispana E-Federacio;

Chuck Smith (Germanio) pro la realigo de la Esperanto-kurso en Duolingo;

László Szilvasi (Hungario) pro informa kaj ĵurnalisma Esperanto-agado;

Francisco L. Veuthey (Nederlando) pro la realigo de 75 filmoj por la Reta Kinejo de UEA;

Kaj

Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia pro la organizado de Esperanta Filmfestivalo.



Esperanto-Redakcio de Ĉina Radio Internacia

Diplomo pri Elstara Arta Agado:

Rogener Pavinski (Brazilo) pro kontribuado al la muzika E-kulturo;

Wang Chongfang (Ĉinio) pro esperantigado de ĉina literaturo kaj pro vortara laboro.



Lillo, Francio, la 1-an de aŭgusto, 2015
<http://esperanto.brazilo.org/archives/1506>







MONDIAL D'ESPÉRANTO

la internacia
lingvo justa !

la langue
internationale
équitable !



